1 / 2016

esperanto.cu

TRIMONATA BULTENO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

**Kion mi faras por Esperanto?**
Gonzalo Collantes García



# 5-a Kuba Esperanto-Renkontiĝo

Maritza Gutiérrez González

De la 15-a ĝis la 20-a de marto 2016, en la Feriejo Ĉielarko de la centra provinco Villa Clara, 8 kilometrojn for de la urbo Santa Clara, okazis la 5-a KERo kiu arigis 48 partoprenantojn, el ili 2 eksterlandanoj, nome el Usono kaj Japanio.

La ĉi-jara evento estis aparte malgranda ĉar ĝi estis adresita al la aktivularo de KEA, tio estas, gvidantoj, komitatanoj, instruistoj kaj aktivuloj el la tuta lando, tiel ke en la renkontiĝo unue laborsesiis la Komitato, kiu dum intensa sesio tuttaga pritraktis la Jaran Raporton pri la Agado en 2015, la evoluon de la spezokontoj, la nunan staton de agadoj tra la tuta lando en la kvar agadkampoj de la asocia laboro, la ĉefajn taskojn de 2016 kaj buĝeton.

La Komitato identigis la ĉefajn problemojn, bezonojn kaj defiojn de la asocia laboro, kaj krome difinis prioritatojn por pliigi la membraron, varbi novajn gelernantojn, Amikojn de Esperanto, reteni la nunajn membrojn kaj videbligi Esperanton kaj la agadojn de KEA en- kaj eksterlande.

Akcepto por la Membroj-Subtenantoj estis programero, kiu celas danki al tiuj membroj kiuj pagas duoblan kotizon kiel konkreta subteno al la vivo kaj agado de la Asocio tutlande.

En la dua tago komenciĝis la bunta programo de KERo dediĉita al la instruado, kie la Kuba ILEI-Sekcio (KIS) gvidis programerojn kiuj konsistis en prelego pri Didaktiko de Gonzalo Collantes García, ILEI-Sekciestro, sekvis aliaj prezentoj de Geomar Martínez Pérez, vicprezidanto de la ILEI-Sekcio kaj Julián Hernández Angulo, estrarano de KEA pri Kapabligo.

Okazis prepara kurso por la KEA-ekzamenoj, paroligaj sesioj, tipaj lecionoj, kunsido de la Kuba ILEI-Sekcio, ekzamenoj kaj didaktikaj ludoj, vuŝuo por la sano, ĉi-lasta programero estis gvidita de Mayra Núñez Hernández.

Dum la vespera programo okazis filmoprezentado kiu ebligis spekti filmojn elektitajn de Geomar Martínez Pérez, krom aliaj materialoj prezentitaj de Tirso Ávila Bory el la E-grupo Guantánamo, pri la urba nokta vivo kaj alia pri la usona militbazo; sekvis prezento de Julio César Tamayo Salas, el Santiago de Kubo, pri la muzika agado de la ensemblo Amindaj el Contramaestre, kies dua albumo *Amindaj amas vin,* estis eldonita de Vinilkosmo en Francio kaj elŝuteblas en ĝia retejo; la ĉeestantoj povis ĝui la muzikon de la nova disko kaj sciis pri la plua laboro de la muzikgrupo.

Sekvatage okazis la Tago de Kulturo, kiu komenciĝis per grupa laboro surbaze de la verko de Claude Piron *La bona lingvo;* la sesion gvidis Maritza Gutiérrez González dum kiu 7 laborgrupojn vigle diskutis diversajn ĉapitrajn erojn kaj poste raportis pri siaj diskutoj; la sesio tre vigle okazis kaj ĉiu grupo elektis reprezentanton por la fina raporto, kio ebligis al ĉiuj mem prezenti siajn konkludojn pri la legitaj eroj de tiu instrua libro.

Kiel parto de la programo sekvis prezento de la Martí-Klubo de KEA, gvidita de Pedro Fernández Rodríguez kaj la premiado de la literatura konkurso. Pri "Martí inter ni" prelegis Isnel Pupo Peña el provinco Holguín kiu prezentis la agadon de la kultura projekto Bona Amiko lige al la Kultura Societo José Martí en tiu provinco.

Dum la evento ankaŭ okazis aktiva sesio de la Radioamatoroj kiuj kontaktis kubajn radioamatorojn kaj disinformis pri KERo; prezento de la tradicia metiejo pri Zamenhof organizita ĉiujare de la grupo de Guantánamo, kiu festis sian 20-jariĝon en decembro 2015.

En sabato okazis kiel planite la ekskursa tago al la urbocentro de Santa Clara kaj la historia Placo kaj Maŭzoleo de Ernesto Che Guevara.

Dum la fermo okazis transdono de atestiloj al la sukcesintoj de KEA-ekzamenoj kaj festo.

KERo estas jam tradicia renkontiĝo kies ĉefa celo estas arigi la kuban esperantistaron, ĉefe aktivulojn por daŭre trejniĝi, plani, instrui, ekzameniĝi, ĝui kaj krei la kulturan etoson kiu kunligas nian senton de aparteno al komunumo lingve konscia kaj aganta favore al disvastigo de la Internacia Lingvo.



# Strategioj por lerni fremdan aŭ negepatran lingvon

Julián Hernández Angulo

Multaj personoj, kiuj lernas fremdan aŭ negepatran lingvon en diversaj lernejoj ne konas la plej fruktodonajn manierojn kaj agojn por lernado sukcesa, precipe kiam ili lernas en lando kie, la lingvo lernata (cellingvo) ne estas la gepatra.

Lerni lingvon kaj fariĝi lingvo-komunika kompetentulo postulas studon, daŭran praktikon kaj sindediĉon. Ne ĉiuj, kiuj lernas lingvon, atingas iun gradon de kompetento pro tio, ke ili ne havas ideon, kiel aliri tiun kompleksan procezon kaj neniu montras al ili sekvendan vojon por sukcesi. Esplori plej bonajn manierojn, agojn lerni lingvon kaj kundividi spertojn kaj travivaĵojn tiurilate kun novaj kolegoj kaj lernantoj estu daŭra tasko de la plej spertaj Esperanto-instruantoj kaj instruistoj.

Por lerni lingvon, oni devas evoluigi kvar kapablojn; temas pri aŭskult-kompreno, parolo, legokompreno kaj skribo. La aŭskult-kompreno kaj la legokompreno estas elkodigaj kapabloj kaj la parolo kaj la skribo estas produktivaj kapabloj. La aŭskult-kompreno kaj la parolo estas parolaj kapabloj kaj la legokompreno kaj la skriboago estas perliteraj kapabloj. Ni memoru, ke analfabetuloj scipovas la parolan lingvon sed ne la skriban. Por komuniki oni devas iugrade posedi lingvistikajn aspektojn; nome, la fonetikan, gramatikan kaj leksikan sistemojn de la lernata lingvo. Surbaze de tiuj ĉi lingvistikaj aspektoj, la lernantoj povas konstrui signifojn, kiam ili aŭskultas, legas, parolas kaj skribas. Manko de tiuj aspektoj malfaciligas kaj bremsas komunikadon. Tiu fenomeno povas esti senkonscia. (Pluraj pedagogoj kaj lingvometodikistoj verkis pri tiu ĉi aspekto).

La strategioj, kiujn la aŭtoro rekomendas, rilatas al la kvar komunikaj kapabloj kaj al la lingvistikaj aspektoj, kiuj subtenas ilin.

Por la evoluigo de la aŭskulta kompreno, mi rekomendas la jenajn agojn (ekzercojn):

- ★ Aŭskulto kaj reaŭskulto de registritaj materialoj (dialogoj, monologoj, rakontoj, kantoj, ktp.) multfoje por trejniĝi en la kompreno de ĉefaj, komplementaj ideoj kaj detaloj. La reaŭskultado de materialoj ebligas identigi vortojn, frazojn, parolturnojn, ideojn, kiujn ni ne aŭdis antaŭe. (Gravas ankaŭ aŭskulti plurajn parolantojn de la lingvo lernata por alkutimiĝi al diversaj akĉentoj aŭ prononcmanieroj.)
- ★ Aŭskultado de parolaj tekstoj por identigi sonojn, intonaciajn modelojn, ritmon, akĉenton, gramatikajn modelojn, vortojn rilatajn kaj komunikajn funkciojn, ktp.
- ★ Filmospektado kaj aliaj aŭdvidaj materialoj kun aŭ sen subtekstoj.

Ne eblas lerni fremdan aŭ negepatran lingvon sen aŭskulti ĝin. Tial lernantoj devas utiligi diversajn momentojn de la tago por aŭskulti la lernatan lingvon. Kuirante, lavante aŭ gladante vestaĵojn, starante en bushaltejo, piedirante, ktp. Oni devas aŭskulti la novan lingvon.

Por plibonigi la lingvan prononcon, la aŭtoro rekomendas la jenajn agojn:

- ★ Aŭskultado kaj reaŭskultado de registritaj materialoj por asimili kaj multe pli konatiĝi kun la diversaj sonoj, intonacioj kaj ritmoj;
- ★ Ripetado de frazoj post modela eldiro por fiksi prononcon, intonacion kaj ritmon;
- ★ Praktiko de laŭtlegado de frazoj kaj alineoj kaj registro de la laŭtlegado por poste sinaŭskulti aŭ por ke alia persono aŭskultu la lernanton por kontroli, kiel li/ŝi prononcas kaj intonacias, kiel vi sonas. Tiel iom post iom oni atingas la ĝustan prononcon de la diversaj sonoj, la intonacion, la akĉenton, la ritmon kaj la kunligon de vortoj.
- ★ Daŭra fonetika transkribado de vortoj, por pli konsciiĝi pri ilia prononco kiam temas pri lingvoj kiel la angla, kies sonoj havas diversajn skribmanierojn, grafemojn.
- ★ Fari ekzercojn kaj ludojn, kie oni devas identigi sonojn, reprodukti ilin aŭ esprimi vortojn per ili. Oni devas priatenti la fakton, ke aŭskultado kaj reaŭskultado de registritaj materialoj ebligas asimili kaj multe pli konatiĝi kun la diversaj sonoj, ritmoj kaj intonacioj.

Por pliriĉigi la vorttrezoron de la nova lingvo, ni rekomendas la jenajn agadojn:

- ★ Legado kaj relegado de pluraj tekstotipoj por familiariĝi kaj pliriĉigi la vortprovizon pri diversaj temoj. Oni ankaŭ povas legi pri ŝatataj temoj, tiel ke la legado ankaŭ estu ĝojplena.
- ★ Legado kaj relegado de lernolibroj kaj ekzercaroj. (La fakto, ke oni finas la studadon de lernolibro dum kurso, ne signifas, ke oni devas ĝin enkestigi kaj ne plu malfermi. Ju pli oni progresas, des pli oni povas kompreni la lingvistikan strukturon kaj komunikan enhavon de relegata teksto).
- ★ Legado por pliriĉigi la vort-trezoron. Kiam oni skribas ĉiujn novajn vortojn kaj poste serĉas ilin en dulingva aŭ unulingva vortaro laŭ la lingvoprogreso. Skribu frazojn per tiuj vortoj, por multe pli fiksi ilin kaj poste de tempo al tempo vi revidu ilin por eviti forgesemon.
- ★ Faru personan vortaron. Notu ĉiujn novajn vortojn, parolturnojn kaj konversaciajn esprimojn, kiujn vi legas aŭ aŭskultas dum via konstanta alproksimiĝo al la lingvo.
- ★ Skribu tuj surpapere vortojn, parolturnojn aŭ aliajn lingvaĵojn kiujn vi aŭskultas aŭ legas en la lernejo, sur la strato aŭ en alia loko, por poste serĉi ilin en vortaro kaj noti ilin en speciala vortarkajero.
- ★ Skribu la novajn vortojn de la semajno sur iu papero, kiun vi metos en tiu loko de via hejmo aŭ laborejo, kie vi plej multe restas, tiel ke vi havu la ŝancon ofte vidi ilin, kio helpos vin aldoni ilin al via vorttrezoro.
- ★ Konatiĝi kun la vortoelementoj kaj la kunmetaĵoj de la nova lingvo (prefiksoj, sufiksoj, kunmetitaj vortoj, ktp.), kio ebligas rekonon kaj aplikon de derivitaj kaj kunmetitaj vortoj de la nova lingvo en diversaj kuntekstoj surbaze de la identigo kaj posedo de radikoj kaj leksikaj kaj gramatikaj morfemoj;
- ★ Daŭre esprimi kaj skribi informojn aŭ faktojn per vortoj, frazoj aŭ esprimoj tuj post ĝiaj aŭskultado kaj legado;
- ★ Fari ludojn, kiuj helpas mencii vortojn de la sama familio, elimini vortojn, kiuj ne rilatas al la grupo, fari frazojn per vortoj, ripeti vortojn antaŭe esprimitajn kaj aldoni pliajn, diveni vortojn, esprimi vortojn rilatajn al temo aŭ situacio, ktp.

Por scipovi la diversajn gramatikaĵojn, ni rekomendas fari la jenon:

- ★ Fari plurajn kaj variajn gramatik-ekzercojn, kiuj estas en libroj kaj ekzercaroj post la studo de la koncernaj gramatikaj reguloj, kiuj ebligas la esprimon de la diversaj komunikaj funkcioj. La plenumo de tiuj ekzercoj ebligos la evoluon de gramatikaj, leksikaj kaj fonetikaj aŭtomatigoj, kio ebligos esprimkapablon ekzaktan kaj fluan.
- ★ Fari ludojn, kie vi devas uzi la gramatikajn regulojn lernitajn, ekzemple, esprimi pasintan tempon, esprimi pasintajn kutimojn, esprimi futuron, ktp.

Ni emfazas, ke paroli estas produktiva kapablo, kiu postulas daŭran ekzercadon, por scipovi tuj reagi flue, kohere kaj ekzakte al nia alparolinto.

# ESTRARA RAPORTO PRI LA AGADO DUM 2015

*La 16-an de marto 2016 Kuba-Esperanto-Asocio okazigis la 32-an Ordinaran Kunsidon de la Nacia Komitato en Santa Clara, Villa Clara. La komitata sesio estis la unua programero de la tutlanda renkontiĝo KERo 2016, kie komitatanoj analizis kaj aprobis la jaran raporton prezentitan de la Estraro pri la agado dum 2015 kiu listigis la ĉefajn agadojn de la jaro kaj aparte la diversajn renkontiĝojn; jen resumita versio kiu revuas skize la agadon plenumitan de la Asocio en la tuta lando.*



*Alberto Fernández-Calienes Barrios, prezidanto de KEA, prezentas la Estraran Raporton al la 32-a Komitatkunsido okazinta dum la 5-a Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERo) en Santa Clara, Villa Clara.* Foto: Maritza Gutiérrez González.

### Enlandaj eventoj

La jaro, aparte vigla, komenciĝis januare per la 1-a Komitatkunsido de Kuba Esperantista Junulara Organizo (KEJO) kaj la 31-a sesio de la komitato de KEA en la Nacia Sidejo; en marto sekvis KERo 2015, Río Seibabo (Villa Clara) kie okazis Eksterordinara Komitatkunsido; novembre, la Lingvistika Simpozio en la Havana Universitato; la 16-a AMO-Seminario; la 6-a Kongreso de KEA kie ankaŭ sesiis Eksterordinara Komitatkunsido.

### Internaciaj eventoj

Pluraj kubaj esperantistoj partoprenis internaciajn eventojn kaj la asocio estis reprezentita en la 48-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Oostende (Belgio) de Alberto F. Calienes, Pedro Fernández Rodríguez, Ariadna García Gutiérrez kaj Geomar Martínez Pérez, kiu lasta prelegturneis dum tri monatoj en eŭropaj landoj (Germanio, Svislando, Francio, Belgio, Nederlando) laŭ invito de Germana Esperanto-Asocio.

En la 100-a UK de Esperanto okazinta en Lillo (Francio), Alberto F. Calienes kaj Pedro Fernández Rodríguez reprezentis la Asocion. Aliaj kubanoj private partoprenis.

En la 71-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazinta en Wiesbaden, Germanio, partoprenis Alberto F. Calienes, Ariadna García Gutiérrez, Geomar Martínez Pérez, Guillermo Sánchez Cordero kaj Joel Brooks Lezcay.

### Eksterasociaj eventoj

KEA estis reprezentita kaj aktive partoprenis kulturklerigajn aranĝojn eksterasociajn , nome, en la provinca biblioteko Rubén Martínez Villena (Havano), kie Julián Hernández Angulo prelegis pri Esperanto; en majo, en reprezento de KEA, ses esperantistoj (Julián Hernández Angulo, Pedro Fernández Rodríguez, Ariadna García Gutiérrez, Maritza Gutiérrez González, Vilhelmo Lutermano kaj Guillermo Sánchez Cordero) partoprenis la sciencan eventon "Lingvoinstruistoj por pli bona leciono" okazinta en la Universitato de Pedagogiaj Sciencoj de Havano; kiel membro kolektiva de la Kuba UN-Asocio (ACNU) KEA partoprenis en la kunsidoj de la civila socio; novembre, Pedro Fernández Rodríguez, ricevis medalon omaĝe al la 160-a Datreveno de José Martí, en reprezento de la Martí-Klubo de KEA.

### Esperanto en la amaskomunikiloj

Radioelsendoj pri Esperanto en Kubo okazis per Radio Havano Kubo, Radio Rebelde, Radio Taíno, COCO, Habana Radio, Radio Progreso, Radio Reloj, Radio Bayamo (Granma), CMKC Radio Revolución (Santiago de Cuba), Radio Angulo (Holguín), Trinchera Antimperialista (Guantánamo), Radio Ciudad del Mar (Cienfuegos).

Televidaj intervjuoj okazis en Tele-Rebelde, Canal Educativo, Canal Habana, Inform-servoj de la Kuba Televido. En la gazetoj *Granma Internacional* kaj *Espacio Laical*. En la eksterlanda gazetaro ni sukcesis aperigi artikolojn en la revuoj *Esperanto, La Ondo de Esperanto, Kontakto,* aperis artikolo pri la Lingvistika Simpozio en *Informilo por Interlingvistoj.*

### Kontaktoj kaj kunlaboro kun Kubaj institucioj

Kuba Asocio de Tradukistoj kaj Interpretistoj, Asocio de Lingvistoj, Instituto pri Literaturo kaj Lingvistiko; Centro de Aplikata Lingvistiko, Universitatoj de Oriente, Santa Clara, Havano kaj Holguín, Ministrejo pri Supera Edukado, Universitato de Pedagogiaj Sciencoj, Medicina Universitato. Ili ĉiuj ricevis ankaŭ raporton pri la rezultoj de la Simpozio.

### Eksteraj rilatoj nemovadaj

La Asocio daŭre flegas siajn rilatojn kun la Ministrejo pri Kulturo, la Fremdlingva Eldonejo José Martí, la Unuiĝo de Arkitektoj kaj Konstruinĝenieroj de Kubo (UNAICC), kaj ties Havana filio (kun kiu KEA havas kunlaboran kontrakton).

### Eksteraj rilatoj movadaj

La Estraro de KEA estas en daŭra kontakto kun la Komitato kaj CO de UEA; Ariadna García Gutiérrez elektiĝis estrarano de TEJO; kun ILEI estas daŭra kontakto kaj aktiva partopreno en la Internacia Konferenco; kun la Amerika Komisiono, pere de Maritza Gutiérrez González, kiu partoprenis en la 55-a Amerikanista Kongreso; kun Flandra Esperanto-Ligo estas tre bonaj kontaktoj. Malavare ili donacis kelkajn abonojn al *Monato;* kun Esperanto USA revigliĝis kontaktoj por ebligi la partoprenon de Usona karavano al la 6-a Kongreso de KEA.

### Regionaj eventoj dum 2015

Okazis tri regionaj eventoj dum la jaro: en majo, la kultura evento "Martí inter ni", kunordigita de Isnel Pupo Peña en la universitato (Holguín); en aprilo, okazis la

Tabelo 1: ***Membrostatistiko 2011-2015 kaj plano 2016***

| | Provinco / Kategorio | | | | | Plano | Realo | Plano |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | 2011 | 2012 | 2013 | 2014 | 2015 | | 2016 |
| 1 | Pinar del Río | 4 | 5 | 17 | 2 | 2 | 2 | 15 |
| 2 | Artemisa | 1 | 1 | 1 | 2 | 2 | 1 | 15 |
| 3 | La Habana | 219 | 193 | 215 | 189 | 201 | 186 | 201 |
| 4 | Mayabeque | 9 | 18 | 20 | 11 | 2 | 5 | 15 |
| 5 | Matanzas | 2 | 20 | 14 | 7 | 2 | 4 | 15 |
| 6 | Cienfuegos | 23 | 17 | 21 | 11 | 31 | 27 | 30 |
| 7 | Villa Clara | 4 | 23 | 36 | 24 | 35 | 17 | 35 |
| 8 | Sancti Spiritus | 1 | 3 | 1 | 3 | 2 | 2 | 15 |
| 9 | Ciego de Ávila | | 7 | 9 | 1 | 15 | 4 | 15 |
| 10 | Camagüey | 7 | 5 | 2 | 6 | 0 | 0 | 15 |
| 11 | Las Tunas | 1 | | 2 | 3 | 3 | 3 | 15 |
| 12 | Holguín | 20 | 10 | 32 | 20 | 31 | 35 | 40 |
| 13 | Granma | 55 | 33 | 45 | 53 | 60 | 61 | 80 |
| 14 | Santiago de Cuba | 75 | 101 | 111 | 126 | 150 | 84 | 101 |
| 15 | Guantánamo | 48 | 35 | 22 | 40 | 45 | 45 | 50 |
| 16 | Isla de la Juventud | 1 | 25 | 4 | 12 | 1 | 1 | 15 |
| | Honoraj Membroj | 4 | 4 | 4 | 4 | 3 | 3 | 7 |
| | Amikoj de E | 66 | 22 | 26 | 17 | | 30 | 50 |
| | **Totalo** | **541** | **522** | **582** | **531** | **585** | **510** | **730** |

E-renkontiĝo en la Feriejo Los Cantiles (Granma); en decembro okazis la 20-a Zamenhofa Metiejo (Guantánamo).

## AGADKAMPO KUNORDIGO

Estraranoj: Alberto Fernández-Calienes kaj Pedro Fernández Rodríguez

La ordinaraj kunsidoj de la NE okazis laŭplane. La ĉiusemajna labora kontakto inter estraranoj bone funkcias. En la Nacia Sidejo de KEA laboris dum 2015 Javier Ramos Nistal, Ismary Lezcano García kaj María Antonia Cartaya Martínez, kiuj dividis inter si la laborojn pri sekretariado, administrado, libroservo kaj membrokontrolo. Ili ankaŭ prizorgas, sub gvido de Alberto Rodríguez Pineda, la aranĝojn en la Nacia Sidejo.

## Evoluo de la membraro 2011-2015

Kompare kun la jaroj 2013 (582) kaj 2014 (531) la evoluo estas malkreska en 2015 (510). La Komitato analizis la statistikon prezentitan laŭ teritorioj kaj konstatis la bezonon aktivigi konkretan agadon por remembrigi iamajn membrojn per rekta invito al rekotizo en 2016.

## Honoraj Membroj

La Asocio havas nun ok Honorajn Membrojn. Aldoniĝis kvin novaj, kiujn dum la 6-a Kongreso de KEA la Nacia Komitato elektis, nome: Francisco Briel de Cañas; Andrés Castillo Jiménez (†); Julio Martínez Fiallo; Fernando Paredes Elósegui; Andrés Rodríguez González. La E-biografietoj de la novelektitaj HM-oj aperas en la n-ro 4/2015 de nia bulteno *esperanto.cu*.

Tabelo 2: ***Membroj-Subtenantoj 2015***

| | | |
|---|---|---|
| 1 | La Habana | 35 |
| 2 | Villa Clara | 6 |
| 3 | Sancti Spíritus | 1 |
| 4 | Ciego de Ávila | 1 |
| 5 | Las Tunas | 1 |
| 6 | Santiago de Cuba | 8 |
| 7 | Guantánamo | 16 |
| | **Totalo** | **68** |

## Agado en filioj/grupoj

En la provincoj Pinar del Río kaj Artemisa, estas nur disaj esperantistoj; en La Habana la prezidanto de la filio, pro laboraj kialoj, rezignis meze de 2015 kaj pri ĝi nun zorgas la Nacia Estraro, ĝis la okazigo de novaj elektoj nun preparotaj. En Mayabeque kaj Matanzas estas nur kelkaj disaj esperantistoj; en Cienfuegos la estraro de la MG stabilas, kontaktoj okazas kun la prezidantino. La grupo kreskis en Villa Clara, kie stabilas grupo en Santo Domingo kaj oni instruas, kunsidas kaj regule sendas la protokolojn. Aliĝis novaj membroj en la ĉefurbo, Santa Clara; en Sancti Spiritus, Ciego de Ávila, Camagüey kaj Las Tunas estas disaj membroj; en Holguín la MG okazigas aranĝojn sed informas neregule. Ili kreskis kompare kun la jaro 2014. Sukcese okazigis la eventon “Martí inter ni” (partopreno, bonaj rezultoj, kunlaboro kun eksterasociaj institucioj, universitatoj). Komunuma laboro de la projekto Bona Amiko, pupteatro kaj partopreno en la loka evento konata kiel Printempa Festo; en Granma la PF okazigas kursojn kaj havas regulan kontakton kun la Nacia Estraro, ili organizis E-aranĝon kaj havas bonajn internaciajn rilatojn; en Santiago de Cuba la PF nombre malkreskis kompare kun 2014; ili regule sendas la protokolojn de la estrarkunsidoj, okazigas aktivecojn kaj instruas diversajn kursojn; en Guantánamo kreskis la membraro kompare kun la jaro 2014 kaj la teamo organizis la tradician decembran aranĝon Zamenhofa Metiejo; en Isla de la Juventud estas nur 1 asociano.

## FINANCO

Estrarano: Maritza Gutiérrez González

Spezoj CUP. Kotizo estas ankoraŭ ne plenumita, sed kontentiga kompare kun la plano. La evoluo de la spezokonto dum la jaro estis pozitiva (en CUP), sed ne vere kontentiga, se oni komprenas, ke la evoluo de la membraro ne estis plenumita laŭ la deciditaj kvantoj akceptitaj dum la pasintjara kunsido de la Komitato.

Spezoj CUC. Malgraŭ deficita jaro rilate la spezokonton (en CUC), la financa evoluo montriĝis stabila kaj la asocio travivis tre aktivan jaron, kreskigis siajn posedaĵojn kaj la valoro de la asocia domo ankaŭ altiĝis, kio faciligas pli bonajn servojn por la membraro ekde la vidpunkto infrastruktura.

## AGADKAMPO KONSCIIGO (INFORMA AGADO. AKTIVULA TREJNADO)

Estrarano: Maritza Gutiérrez González

Konsciigo. Dum la jaro ne plene ekaktivis la laborteamo pri Informado, nur sporadaj informfluoj cele al la Fondodatreveno de KEA, la Tago de la Gepatra Lingvo kaj la 6-a Kongreso; intensiĝis reprezentado en eksterasociaj forumoj kaj disvolviĝis aktivula trejnado ĉeesta.

Amerikanista kongreso. Kontribuo al sciencaj studoj. De la 12-a ĝis la 17-a de julio 2015 okazis en Salvadoro la 55-a Internacia Kongreso de Amerikanistoj (ICA) sub la temo “Konflikto, paco kaj identeco-konstruo en la Amerikoj”. La 55-a ICA sesiis en la Universitato Francisco Gavidia (UFG) de Salvadoro, kie ariĝis pli ol 2000 fakuloj el pli ol 20 landoj. Nome de la Amerika Komisiono de UEA kaj danke al ties financa subteno kaj tre speciale al ESF (Esperantic Studies Foundation) kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), okazis la reprezentiĝo kaj prelego en tiu ĉi kongreso.

## Informado

**Interne.** Redakta laboro por la bulteno *esperanto.cu* kiu aperis 4-foje en la jaro; regu-




la informado pri agadoj de KEA tra diversaj retlistoj kiel Landa Agado, Ameriko, revuo Espe-ranto kaj la amikaro de Radio Havano ĉe Fejsbuko; ankaŭ enlande estis senditaj informoj al aktivuloj pri informado en Santiago de Cuba kaj Granma.

**Alekstere.** Retejo: Ĝi paneis pro teknikaj kialoj. La paĝo suferis lamaĵojn kiel tuja sekvo. Ni klopodis rearanĝi la paĝaron ĉe Cubarte, sed ne eblis dum la jaro. Por la kongreso ni devis pagi aldonan retejon *www.esperantocuba.org* kiu solvis la informan flankon. Tiu ĉi restas pendanta temo; partopreno en la Librofoiro en Havano, Granma kaj Santiago de Cuba; okaze de KERo efektiviĝis la informa laboro tutlanda per radio, retlistoj tutmonde, Facebook kaj retmesaĝoj al nia reta amikaro; gazetaraj komunikoj estis senditaj okaze de la 36-a Fondodatreveno de KEA al diversaj radiostacioj tutlandaj; diversaj intervjuoj en provincaj kaj tutlandaj radioelsendoj kunlabore kun aktivuloj Roberto Nuñez kaj Ariadna García (Havano), Gonzalo Collantes (Santiago de Cuba), Rafael Cabrera kaj Anyer Montero (Granma) pri Esperanto kaj kursoj de KEA; informoj pri kursoj estis afiŝitaj en la reklama cifereca gazeto Ofertas de la Nacia Informagentejo (ACN); por la 6-a Kongreso de KEA informoj fluis tra la diversaj retlistoj kiel Landa Agado, Ameriko kaj ret-info; sendado de komuniko al radiostacioj kiel Radio Reloj kaj Radio Progreso; disvastigo tra Radio Havano Kubo kaj ties retejo. Aperigo de kongresa reklamo en la retejo de Radio Havano kaj partopreno en radiointervjuoj ĉe Radio Taíno kaj la matena televida programo Revista Informativa de Tele-Rebelde. Kreado de la retejo *www.esperantocuba.org;* ankaŭ dum la internaciaj eventoj oni reklamis la kongreson; aperis aliaj artikoloj en la gazetoj *Esperanto* (majo, junio, 2015) kaj *La Ondo de Esperanto* (decembro, 2015).

## Aktivula trejnado

Okazis tri seminarioj dum la jaro, kompare al unu en 2014, plus AMO-16: Seminario dum la Komitatkunsido januare, 30-31 pri la temo "Kiel varbi novajn membrojn?; Seminario okaze de la Havana Librofoiro sesiis la 6-an de februaro en la sidejo de KEA; Aktivula Trejnado okazis kadre de KERo 2015 kaj partoprenis pli ol 40 aktivuloj (vd. *esperanto.cu* 1/2015); AMO-16. "Konsciigo, Kapabligo, Komunumo: paŝoj al plia profesiiĝo"; ĝi okazis tuj antaŭ la kongreso (vd. *Esperanto,* feb. 2016).

## AGADKAMPO KAPABLIGO

Estrarano: Julián Hernández Angulo

Daŭraj kontaktoj kun la Estraro kaj membroj de la ILEI-Sekcio por garantii planadon, komencon kaj finon de regulaj kursoj; okazis tiaj kursoj en Guantánamo, Santiago de Cuba, Granma, Holguín, Villa Clara (Santo

**Ĉu**

***vi jam pagis vian kotizon?***
***vi jam varbis interesitojn por la E-kurso?***
***vi ne pretas mem instrui?***

**Ek!**



Domingo), Cienfuegos kaj La Habana. Oni instruis postbazajn kursojn kaj en Santiago de Cuba kaj en La Habana. En aŭgusto efektiviĝis seminario por instruistoj en Havano kiun partoprenis ne nur instruistoj, sed ankaŭ aktivuloj; dum la lasta sabato de majo, septembro, novembro, januaro kaj februaro, oni instruis ekspresan kurson por varbi interesitojn kaj daŭre venigi ilin al la Asocio. Nur okazis ekspresaj kursoj en Havano, kio ne ebligas pli fortan plenumon de tiu celo tra la lando. Bedaŭre la distanca kurso ne sukcesis allogi homojn malgraŭ klopodoj faritaj kaj de la prezidanto de la ILEI-Sekcio kaj de la estrarano.

Rilate la KEA-ekzamenojn, oni organizis sesion dum KERo en Río Seibabo (Villa Clara) kun pli ol dek kvin esperantistoj kaj sukcesis dek du. Oni ankaŭ trejnis aktivulojn dum kvin sinsekvaj mardoj por prezentiĝi al la baza kaj meza ekzamenoj okazintaj en marto en la Nacia Sidejo de KEA. Dek aktivuloj entute ekzameniĝis: 4 por la meza, kaj 6 por la baza. Oni daŭre, ĉiun duan monaton, okazigas kunsidojn kun la havanaj instruistoj. Okaze de la Tago de la Instruistoj, la Nacia Estraro stimulis ĉiujn instruistojn per librodonaco.

En numero 3/2015 de *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR), oni aperigis artikolon pri strategioj por lingvolernado verkita de la estrarano. La sekcio ankaŭ aperigis artikolojn pri aferoj rilatantaj al ILEI en la bulteno de KEA.

## AGADKAMPO KOMUNUMO

Estrarano: Juan Ramón Rodríguez Gómez

La plej granda laboro en tiu ĉi kampo temis pri la finredakto, reviziado kaj eldono de *El Esperanto en Cuba (1904-1973),* sed ankaŭ pri listigo kaj priskibo de dokumentoj; atento al petoj de informoj pri historiaj aferoj (flanke de: KEJO, ILEI kaj kelkaj esploristoj, kiel Hitchman Powell, Ariadna García Gutiérrez, William Sánchez kaj ĵurnalistoj); prelegoj por KERo kaj la Lingvistika Simpozio; pretigo de dokumentoj por la dua volumo de *El Esperanto en Cuba* (kun helpo de Javier Ramos Nistal); kaj elekto de materialoj por ekspozicioj (Librofoiro, Lingvistika Simpozio kaj la KEA-sidejo). Rilate la bibliotekon de KEA, finiĝis la klasifa kaj organiza laboro por ĉiuj libroj ekzistantaj tie (kun granda helpo de María Antonia Cartaya), kaj estis finpretigita la interna kontrolo de la ĉefaj gazetoj kolektataj (*Avanco, Esperanto, Kontakto, La Noktuo, Literatura Foiro, Malgranda Revuo* kaj *Monato*).

Kunorganiza laboro por la KEA-kongreso, la Lingvistika Simpozio, sed krome rilate la programon kaj la kunredakton kaj eldonon de la *Kongresa Libro;* preparo de la koncerna propono por havigi al ni kvin aliajn HM; kontrolvizitoj al filioj; kunlaboro por la bulteno *esperanto.cu,* laboro kiel ĵuriano de la konkurso de la Martí-klubo.

## EKSTERAJ RILATOJ NEMOVADAJ / NACIA SIDEJO

Estrarano: Alberto Rodríguez Pineda

Prizorgo de la eksteraj rilatoj nemovadaj de KEA kun diversaj institucioj inter kiuj Ministrejo pri Kulturo, Kuba Libroinstituto, Fremdlingva Eldonejo José Martí, Kuba Libroĉambro kaj aliaj laŭ la laboro.

### Nacia Sidejo

En la Nacia Sidejo okazas la administrado kaj plenuma flanko de ĉiuj aktivecoj de la Asocio. Ĉiuj kontaktoj kun institucioj kaj personoj iras tra la NS kio postulas ĉiutagan laboron. Korespondado, subskribo de kontraktoj, kunsidoj, inspektoj, ktp. La organizado de la E-aranĝoj de KEA (renkontiĝoj, seminarioj, kongresoj ktp. estas tie organizataj kaj plenumataj). Oni daŭre instruis regulajn kaj ekspresajn kursojn kaj okazigis diversajn aranĝojn, inter kiuj ankaŭ la sabatajn kulturajn aranĝojn. Oni ankaŭ profitis vizitojn de alilandaj esperantistoj por organizi E-renkontiĝojn. Ĝi ofte estis renkontiĝejo de esperantistoj el la tuta lando. La NE alte taksas la rezultojn de la laboro de la Nacia Sidejo de KEA.

**El la redakcio:** *Tiu ĉi estas resumita versio de la Estrara Raporto; la originala troveblas en la arkivoj de la CO de KEA ĉe la sekretariejo.*

## Niaj Honoraj Membroj

Juan Ramón Rodríguez Gómez

Socorro Castro Acosta naskiĝis la 2-an de julio 1916 kaj eklernis Esperanton 1983, en Manzanillo (provinco Granma), kiam ŝi estis 67-jaraĝa. Tuj ekagis konstante kaj sindediĉe por disvastigi Esperanton kaj evoluigi ĝin en sia urbo. Inter pluraj taskoj, ŝi instruis la lingvon al dekoj da interesitoj ekde 1985 kaj estis estrarano pri Financo en la loka grupo La Verda Standardo, ambaŭ laboroj ĝis 1994. Dum tiu etapo, ŝi ankaŭ altigis sian lingvonivelon per du superaj kursoj sub la gvido de la elstaraj E-instruistoj Pedro Pablo Lamas (HM de UEA, Ciego de Ávila) kaj Marin Bacev (Bulgario). Partoprenis en multaj eventoj, inter kiuj la Unua Kongreso de KEA (Havano, decembro 1987) kaj la 75-a UK (Havano, julio 1990) kaj en pluraj komitatkunsidoj. Ŝi multege kontribuis al la starigo de la Provincia Filio Granma. Krom individua membro de UEA, en 1996 ŝi estis elektita Honora Membro de KEA. Socorro Castro Acosta forpasis 92-jaraĝa en Manzanillo la 14-an de januaro 2008.



*Socorro Castro Acosta dum KEA-Kongreso (marto 1999) en la korto de la Domo de Amikeco en Havano.* Foto: Komisiono pri Historio de la E-Movado en Kubo.



## Mia kontribuo al Kuba Esperanto-Asocio

**Gonzalo Collantes García**

★ Eklernis Esperanton en 1991. ★ Fine de la sama jaro ekagis kiel instruanto en Santiago de Cuba. ★ En 1992 iĝis estrarano pri edukado en la Provinca Filio. ★ Membro-fondinto de la Provinca Filio, daŭre rolis en la instrua fako. ★ Prezidanto de la PF, nuntempe sekretario. ★ En 2004 estis invitita gvidi kursojn en Brazilo. De tiam 7-foje vojaĝis tien por gvidi E-kursojn en la urbo Maceió, ŝtato Alagoas. ★ Ekde 2015 estas la kuba ILEI-sekciestro. ★ Nuntempe estas membro de la Elekta Komisiono de la Komitato de KEA.

### INFORMILO DE LA NACIA SIDEJO (ĝis 2016-03-31)

***Membroj-Subtenantoj 2016***

**Havano (23):** Ángela María Pedroso Cuesta, Onoermis Acuña Velázquez, Alberto Rodríguez Pineda, Noel González Fernández, Luis Enrique Rizo García, Oscar Asensio Pisciotta, Yordán Fonseca Olivera, Marta Eugenia Alonso Gutiérrez, Ismary Lezcano García, Digna Mayra Morales Burón, Alberto Fernández-Calienes Barrios, Javier Ramos Nistal, Olga Lidia Barrios Cunningham, María Antonia Cartaya Martínez, José Luis Hernández Carvajal, Miguel Ángel González Alfonso, Daimi Doval Delsa, José Cárdenas Zúñiga, Juan Carlos Montero Medina, Vilhelmo Lutermano, Julián Hernández Angulo, Magaly Valdés Serrú, Elmer Lores Matos. **Mayabeque (1):** Yunior Benítez Alonso. **Sancti Spíritus (1):** Yoandra Rodríguez Labrada. **Guantánamo (5):** Leonardo Luna Neyra, Tania Laurencio Molina, Tirso Ávila Bory, Asiel Torres Laurencio, Iliagne Torres Jardines.

***Donacoj***

**Martí-Klubo:** Vilhelmo Lutermano (CUC 20.00); **Kuba Esperantista Junulara Organizo:** Vilhelmo Lutermano (CUC 16.00); **Fonduso Instruado:** Ángela María Pedroso Cuesta (CUP 100.00), Alberto Fernández-Calienes Barrios (CUC 2.00), Diana González Padilla (CUC 3.00), Alberto Rodríguez Pineda (CUC 10.00). **Ĝenerala Kaso:** Yunior Benítez Alonso (CUP 25.00).

***Al ĉiuj KEA tre kore dankas.***

# Krucvortenigmo


**HORIZONTALE**

**1.** Punkto, en kiu la vertikalo de iu loko renkontas la ĉielan imagan sferon. **2.** Lirika poemo dividita en strofoj. **3.** Metalo brile blanka kaj ne oksidiĝanta en la aero. **4.** Nomo de la dekdua litero de la greka alfabeto. **5.** Malagrabla, nerv-incita sento kaŭzata de bruo akuta, i.a. **6.** Tiu kiu pretigas por publikigo la verkon de alia. **7.** Plurala pronomo persona, akuzative. **8.** Urbo de la 101-a UK. **9.** Rezulto de sportludo atingata per ĵeto de pilko en la celon. **10.** Rando de ŝtofo refaldita kaj kudrita, tiel ke la eĝo restu nevidebla. **11.** Malgranda fiŝo kun skvametoj, kiu vivas en riveroj kaj lagoj eŭropaj. **12.** Malĉefa planedo kiu rivoluas ĉirkaŭ astro, ankaŭ ekzistas artefarite. **13.** Enorma amfiteatro el la romia epoko, kies grandiozaj ruinoj plu staras.

**VERTIKALE**

**1.** Iniciatinto de la Lingvo Internacia. **2.** Multesciado pri detaloj kaj dokumentoj en ia faka scienco. **3.** Adverbo signifanta nedifinan lokon. **4.** Genro el mamulo, familio de fokulo, vivanta sude de Sudameriko. **5.** Organa korpo produktata de la inoj de diversaj klasoj de animaloj. **6.** Indika tabelo, ordigita laŭ alfabeta ordo. **7.** Paperstrio bindita kune kun la libro, kiu utilas por aldoni bildon. **8.** En kemio, grammolekulo. **9.** Nedifinita pronomo.

*La solvo al la krucvortenigmo aperos en la venonta eldono de nia bulteno. Inter la sendintoj de la ĝusta solvo ni lotumos libropremion. Ek do!*



esperanto CUBA
**Kuba Esperanto-Asocio**
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484
info@esperanto.co.cu
www.esperanto.cult.cu







*Gratulon en la 55-a Datreveno!*

*www.radiohc.cu/eo*

**RADIO HAVANO KUBO**

**Kurtondaj kaj retaj elsendoj en Esperanto**

**Nun ankaŭ en 102,5 FM!**